

Kiom da lingvoj ekzistas? Oni kutime informis, ke 2 ĝis 3 miloj. En GDR aperis antaŭ nelonge publikaĵo, kiu mencias ekziston de 5661 lingvoj. El ili 1400 estas menciitaj kiel lingvoj de subevoluintaj aŭ formortantaj etnogrupoj. El 4200 lingvoj, kiuj estas rekonataj kiel memstaraj estas nur 500 tre bone esploritaj.

Kolik je jazyků? Obvykle se uvádělo, že 2 až 3 tisíce. V NDR vyšla nedávno publikace, která hovoří o existenci 5661 jazyků. Z nich 1400 je klasifikováno jazyky plně nevyvinutých nebo vymírajících etnických skupin. Ze 4200 jazyků, které jsou uznávány jako samostatné, je pouze 500 velmi dobře prozkoumáno.

Novaj finstudintoj de la koresponda kurso:

Hyková Irena, 1946, 10000 Praha 10

Kos Ladislav, 1956, Praha 10

Estu ilin bonvenigataj en nia Verdan Familion! Invitu ilin en viajn klubojn! Multaj finstudintoj plendas, ke ili ne trovas eblon paroli E-e!

Akvobienalo 1984: (En julio) Posedantoj de kiu ajn ŝipo bonvenigotaj! Oni dormos sub tendoj, manĝaro propramone. Informoj Georgo Milev, Na Vyhlídce 41, Karlovy Vary.

Renkontiĝoj en Mělník: 12.XI.83 Libera tribuno, gramatikaĵoj, traduko laŭ diktaĵo, interŝanĝo de gazetoj.

17.XII.: Tago de la esperanta libro memortago de LL Zamenhof – vendo de esperantaj gazetoj kaj libroj – profito por la kaso de la klubo. (Renkontiĝoj ĉiam sabate je la 10a horo en la klubejo Jungmannovy sady. Detalaj informoj poŝt.schr.25, tel. Tel. 3058.

Setkání v Mělníce: 12.XI.83. Volná tribuna, gramatika, překlad podle diktátu, výměna časopisů. - 17.XII.: Den esperantské knihy (Zamenhofovo výročí) – bazar esper. knih a časopisů – výtěžek ve prospěch klubu. (Setkání vždy v sobotu v 10 hodin v klubovně v ZDŠ Jungmannovy sady. Podrobné informace EK, pošt. schránka 25, tel. 3058.

Stampilon kun via adreso kaj esperanta steleto, aŭ kun adreso de Via eksterlanda amikoj, se vi volas ĝojigi ilin por donaco, fabrikas en mallonga tempo Výrobní družstvo ZNAK, Železná 8, 46001 Liberec.

Internacian korespondan adresaron sendos al vi kaj vian adreson aperigo R.J.Zvěřina, ul. 5. května, 46001 Liberec.

Traduka konkurso daŭras – petu la taskojn E kaj F (resendotaj ĝis fino de novembro 83) ĉe la organizanto Zdeněk Řezáč, Šumburk, Vítězná 355, 46841 Tanvald.

Kulturaj Esperanto-tagoj 1983 – komence de decembro en Poprad. Dum KET okazos konkursoj en diversaj kulturaj agadkampoj:

1. Deklamado de poezio kaj prozo. - 2. Literaturaj verkoj. - 3. Fotografiaĵoj. - 4. Diapozitivoj. - 5. Filmoj. - 6. Aŭdovidaj programoj. - 7. Esperantaj kantoj.

La limdato (lhŭta) por sendi aliĝilojn (přihlášky) kaj materialoj estas jena: - la 4a novembro 83 en kategorioj 2 kaj 7, - 16a novembro en kategorioj 1,3,4,5,6. En ĉiu kategorio laboras 3-5 membra komisiono. La plej bonaj konkursaĵoj estos prezentitaj dum solena vespero de KET 83. Aliĝilojn sendu kaj informojn petu de: Slovaka Esperanto Asocio, Sobotské nám. 6, 05801 Poprad.

Esperanto en hungaraj lernejoj. En mezlernejoj estas E-o la tria elektebla (volitelný) lingvo. La ministerio pri lernejaferoj nomumis (jmenovalo) la inspektoron por lerneja instruado de E-o la tuta ŝtata teritorio. (Zsusza B. Barsay, konata pedagogino).

Ĉu vi ankaŭ klopodas liberiĝi de via nacia pensmaniero? Elskribu sekvajn parolturnojn laŭ Plena Ilustrita Vortaro:

Ŝtona akrigilo = kamenný brus. - Ebenbatitavojo = udusaná cesta. - Antaŭpremita armita betono = předpjatý beton s armaturou. - Streĉi (malstreĉi) la bremson = zatáhnout (uvolnit) ruční brzdu. - Buŝo de rivero (pafilo) = ústí řeky (pušky). - Motorciklo kun kromĉaro = motocykl s lodiĉkou. - Degeligi kreditojn = uvolnit úvěry. = Dedekstra pasrajto = pravidlo pravé ruky. - Iriŝa diafragma = centrální clona (foto). - Dolorige sur trei la piedojn de iu = bolestivě někomu šlápnout na nohy. - Mi donos al vi sur nazon = dám ti do nosu. - Doni al iu piedon en la postaĵon = kopnout někoho do zadku. - Erodi moneron (ŝuojn) = ošoupat, odřít drobné peníze (boty). - Eskalimunaĵo = nylonové punĉochy nepouštějící oka. - Fordoni la okazon = zaspát příležitost. - Eletendi la langon = vypláznout jazyk. - Fajfi por la hundo = pískat na psa. - Fajfi tra la fingroj = pískat na prsty. - Prifajfi aktoron = vypískat herce. - Mi fajfas pri tio = kaŝlu na to. - La kolumo ion disfadeniĝis sur la rando = límec se na okraji trochu roztřepil. - Pasi tra la fajro por iu = skočit pro někoho do ohně. - Fali al iu sur la kolo = padnout někomu kolem krku. - La temperaturo konstante defalas = teplota stále klesá. - Enfali en la mizeron = upadnout do bídy. - La branĉoj subfalas sub la neĝo = větve klesaly pod sněhem. - Strikte fasonita robo = róba těsně střižená. - Senfebriga drogo = lék proti horečce. - La praga trafenestrigo = pražská defenestrace. - Dismalfermita vundo = zející rána. - Fandformi vitran tubon = zatavit skleněnou trubici. - Enflari tabako = ŝnupat tabák. - Fulinia aŭtomobila karoserio = aerodynamická karoserie auta. - Preterfluge ion aŭdi = letmo něco slyšet. - Alforĝi al si rigardon de la publiko = upoutat na sebe zrak (pozornost) veřejnosti. - Frapadi per la dentoj = cvakat zubama. - Frapiĝi kontraŭ tablo = uhodit se o stůl, narazit na stůl. Kunfrapiĝo de aŭtomobiloj = srážka aut. - La rivero jam al frostiĝis = řeka již zamrzla. - La plantoj forfrostiĝis = rostliny zmrzly. - Ricevi defrotaĵojn = utrpět odřeniny. - Renversi ion la fundon supren = obrátit něco dnem vzhůru. - Reversi ĉemizan kolumon = obrátit límec u košile. - Engastiĝi en hotelo = ubytovat se v hotelu. - Surgenuiĝi = kleknout na koleno. - Stari unugenu = klečet na jednom kolenu. - Glaciigita de teruro = ztuhlý hrůzou. - Aeroglita trajno, boato = vlak, loďka pohybující se na vzduchovém polštáři. - Ruladi kuglojn = koulet kuželky. - Prezenti la brakon = nabídnout rámě. - Prezenti la manon = podat ruku. - Bruligi al si haŭton ĉe la suno = opálit se sluncem do hněda. - Ĝi iris al li preter la buŝon = uniklo mu to před nosem. - Butonumi iun malvaste (severe lin obeigi) = sešněrovat někoho. - Alportu al mi ĉerpeton da akvo = přines mi doušek vody. - Saltadi de unua al deka = mluvit páte přes deváté. - Imposto super la aŭtomobiloj = daň z automobilů. - Laŭenspeza imposto = daň z příjmů.

Kompilis Karel Blažek

„Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio“, kiun laŭ la memuaroj de D-ro Stanislav Kamarýt, redaktis inĝ. Jan Werner, aperos ĉe ĈEA espereble ĉi-jare (letos). - Ĝi kostos kvardek-kelk kronojn. -

Ĉu unuhora ĉiutaga radioprogramo en Esperanto? Se vi volas ĝin el Radio Polonia, respondu kaj sendu al RP, Esperanto-redaktado, PL-00950 Warszawa PK 46, Polso jenajn demandojn: 1. Ĉu vi opinias, ke la enkonduko de unuhora elsendo estus bonvena kaj utila? - 2. Se jes, kion vi dezirus aŭdi en tiom ampleksa Esperanto-elsendo ĉiutaga? - 3. Je kioma horo estus – via opinie – plej dezirinde komenci tian radioelsendon? (Indiko en la griniĉa aŭ mezeŭropa tempo). (Nuna elsendo 6.30, 12.00, 20.30/200, 41 kaj 49 m)

Felietono, kie estas elpensita eĉ ne unu vorto. JARY.

Starante en la halo de nia pardubica stacidomo kun plastika teko (braŝna) sur kiu estas granda verda stelo, mi atendas. Jam du vagonaroj alveturis, sed neniuj venis al mi. Kiuj mi atendas? Mi scias nenion, ĉu li estas longa aŭ dika, juna aŭ maljuna, kiel li estos vestita, ĉu normale kiel ni aŭ en sia nacia kostumo. Nur nomon mi konas, ĝi momentale ne helpas al mi, kaj horon de lia vagonaro.

Sur stacidoma tabulo elsaltetas pluaj alvenoj de vagonaroj, havantaj pli ol 200 minutoj de malfruiĝo. Terura tempo. Plej multe nervozigas min hazardaj gekonatumoj, demandantaj kun rideto, kiuj mi atendas. Rendevuo – kaj li ne venis? Oh, se vi sciis, stultuloj, ke mi ne scias, kiuj mi atendas!

Dume en miaj pensoj mi denove tralegas la leteron de la nekonata esperantisto pri kiu ni babilis en la klubo... „Dum mia vojaĝo tra 23 landoj mi volas halti ankaŭ en via urbo. Por unu nokto mi proponas dektagan senpagan (bezplatný) restadon en nia lando...“ „Gesamideanoj, ĉu inviti lin aŭ ne?“ „Jes, invitu lin, povos esti interesa babilado kun li. Tiu lando estas por ni tute nekonata.“ „Jes, mi invitos lin – mi havos zorgojn kaj laborojn kaj vi nur amuzos...“

Tamen ankaŭ mia scivolemo venkis, kvankam mi nereagos je invito al li lando kaj krom tio kiel delegito de UEA mi ĉiam klopodas helpi.

Pluaj 3 vagonaroj venis. Senĉese mi tenis mian tekton tiel, ke la verda stelo estu bone videbla, sed denove (zнову) neniuj venis. Malgaja mi iras hejmen, rememorante, kion mi povis fari anstataŭ (namísto) tri horoj de vana (zbytečný) atendado kaj ankoraŭ mi devos telefoni al geklubanoj, ke la kunveno kun eksterlandano ne efektiviĝos (neuskuteční se).

Pluaj tagoj fluas; proksimiĝis ekskurso de nia esperanta infana grupo al Nikolao-vespero al Jablonec. Kvin miaj lernantinoj prezentos tie teatraĵetan sceneton, sed dum tiuj vintraj tagoj ili ne regule vizitadas E-kurson pro oftaj malsanoj, aŭ ĉar „panjo ne permesis al mi partopreni E-kurson, ĉar mi ricevis malbonan noton de matematiko“ ktp. (=kaj tiel plu = a tak dále). Tamen ĉefprovo kontente (uspokojivě) finiĝis, ĉio estas preparita por ekskurso de 14 personoj per du aŭtomobiloj kaj kvar personoj veturos per buso. Ankaŭ tranoktado tie estas konfirmita (stvrzeno), nur mi timas, ke iu el infanoj ne malsaniĝu. Pri tio mi neniam certas.

Estas sabato; mi preparas mian valizon (zavazadlo) kaj pluajn bezonojn por tiu sceneto (infanoj certe ion forgesus hejme). Post 3 horoj ĉiuj kunvenos antaŭ nia domo por forveturo.

Iu sonoras (zazvoní). Mia Dio, ĉu denove iu infano ne povos vojaĝi? Mi rapidas malfermi la pordon. „Bonan tago. Mi estas esperantisto E.J. el Turkejo. Mi ĝojas, ke mi sukcese trovis vin!“

Mi povis nur profunde elspiri. „Nun vi venis! Antaŭ semajno mi atendis vin vane pli ol 3 horoj en la stacidomo“. /Mi eĉ ne kapablis diri – koran bonvenon (uvítání)./ „Post mallonga tempo ni forveturas. „Tamen necesas decido. „Se vi estos multe modesta (skromný), vi veturos kun parto de nia grupo per buso al Jablonec, en aŭton mi prenos blovmatracon kun dormosako, sur kiu vi dormos. Ĉu tio sufiĉos al vi? Alian eblecon mi ne havas.“

Kaj la neatendita gasto kun ĉio konsetis, manĝis ĉion, kion li ricevis, estis por ni ĉiuj bona kunulo, kaj la programo ne Jablonec tre plaĉis al li, ĉar en Turkujo ne estas konata nia tradicia Nikolao-vespero kaj disdonado de donacetoj.

Kaj jam venadas de li bildkartoj el pluaj landoj, kie li senĉese (neustále) rememoras nian bonan kolektivon.

JARY

Faktoj, argumentoj. Uzu ilin varbcele! (laŭ doc.Dr Novobilský)

Nia scienc-teknika sekcio de ĈEA havas 140 membrojn-fakulojn. Ili preparas seminarion (31.8.84) en Brno kun ĉeftemo: „Perspektivoj de tutmonda nutraĵprodukto.“ Niaj kemiistoj tradukas kun amerikaj kemiistoj-esperantistoj la plej modernan american lernolibron „General, Organic and Biochemistry“, kiun transdonos duobla portanto de la Nobel premio Linus Pauling simbole al la studentoj de la evoluantaj landoj. - Internacian simpozion Interkomputo 1982 en Budapeŝto partoprenis 200 fakuloj. Sola agadlinvo estis E-o. Ankaŭ la 1200paĝa resumo eldonita nur en Esperanto. E-on krom la anglan ankaŭ uzis sciencistoj, partoprenintoj de Internacia kibernetika konferenco ekz. en Namur (Belgio) 1980. Estas registritaj 1800 tradukoj el 400 ĉeĥaj verkistoj. Ĉeĥaj naciaj operoj Vendita fianĉino, Najado, En la puto estis disaŭditaj esperantlingve far Ĉeĥa radio. - Ĉeĥa MEM-sekcio havas sian aktivan delegitaron en la Monda Packosilantaro. - Laŭ propono de la hungara registataro la monda konferenco pri turismo (Manila 1980, unu el la agadlingvoj estis E-o), akceptis rezolucion rekomendantan E-on po ĝenerala uzo en turismo. - Ankaŭ ĝenerala konferenco de UNESCO jam en 1954 rekomendis subtenon de la evoluo de E-o kaj regule raportoj al la sekretario. - 1974 proklamis la Lingvosciencia instituto de la Akademio de sciencoj de USSR E-on konvena internacia komunikilo.

Fakta-argumenty užij při náboru! (Podle doc. Dr Novobilského)

Naše vědecko tech. Sekce ČSEu má 140 členů-odborníků. Připravují seminář (31.8.1984) do Brna s hlavním tématem: „Perspektivy světové produkce potravin. Naši chemici společně s americkými chemiky-esperantisty překládají nejmodernější americkou učebnici „General, Organic and Biochemistry“, kterou symbolicky předá dvojnásobný nositel Nobelovy ceny Linus Pauling studentům rozvojových zemí. - Mezinárodního simpozia Interkomputo v Budapešti účastnilo se odborníků. Jedinou jednací řečí bylo E-o. Také 1200stranový sborník byl vydán jen v Esperantu. E-a kromě angličtiny použili vědci a účastníci Mezinárodní kybernetické konference např. v Mamur (Belgie) m1980. - Je registrováno 1800 překladů 400 českých autorů. - České národní opery Prodaná nevěsta, Rusalka, V studni byly vysílány v Esperantu českým radiem. - Česká MEM-sekce má své aktivní delegáty ve Světové radě míru. - Podle návrhu maďarské vlády Světová konference o turistice (Manila 1980, jedním z jednacích jazyků bylo E-o) přijala rezoluci doporučující E-o k všeobecnému použití v turistice. Také všeobecná konference UNESCO v Montevideu 1954 už doporučila podporu rozvoji Esperanta a pravidelné hlášení sekretariátu. - 1974 prohlásil Jazykový vědecký ústav Akademie věd SSSR Esperanto za vhodný jazyk pro mezinárodní komunikaci.

Andrea Doria. El „Vodní revue“ 1/83 esperantigis J.Borský.

Nokte, la dudek kvinan de junio 1956 je la dudek tria horo naŭa minuto proksime de massachusetta Nantucket karambolis (srazila se) itala persona ŝipo Andrea Doria, naĝanta (plavící se) en Novjorkon, kun sveda ŝipo Stockholm, celanta el Novjorko al Kopenhageno. Peza pruo (příd)

de Stockholm breĉis (prolomila) ŝip/trunkon de multa pli granda Doria per forto de pli ol miliono da tunoj kaj penetris (pronikla) proksimume dudek metrojn en sub/ferdekon (podpalubí) antaŭ ol ĝin haltigis ŝtal-septo (ocelová přepážka). Ambaŭ ŝipoj poste dis/iĝis (oddělily se) kaj ree (opět) malaperis en nebulo, eĉ ne interkonatiĝante. Dek du horojn post la karambolo sinkis (klesla) pli ol ducent metrojn longa Andrea Doria, tiem dek unua la plej granda ŝipo de la mondo, sur fundon de Atlantiko. Ĝi estis fiero (pýcha) de itala civila floto. Al lasta navigado ĝi ekvetruis 1134 vojaĝantoj kaj 572 ŝipanoj sur ferdeko. Krom proksimume (přibližně) kvardek homoj kiuj perdis vivojn rekte ĉe karambolo, oni sukcesis savi (zachránit) ĉiujn. Al log/aĵoj (lákadla), kies celo estis pligrandigi intereson de vojaĝantoj pri navigado per tiu luksa ŝipo, apartenis tri naĝ/basenoj, tri kinejoj kaj arta galerio kun verkoj de Michelangelo, Raphaelo, Tizian kaj Celini.

Ankoraŭ en la sama jaro real/igis James Dugan, Luis Malle kaj Frederic Dumas skafandristan ekspedicion (výpravu) surloke de la karambolo. En la programo, planita por kvar tagoj, estis filmi la sub/akviĝintan ŝipon. Dum esplora (výzkumné) mal/supren-iro (sestup) konstatis francoj Dumas kaj Malle, anoj de esplora teamo de J.Y.Cousteau, ke a transoceana ŝipo kuŝas sub nivelo multe pli profunde ol ĝis nun cititaj kvindek metroj. Sed la akvo en profundaĵoj estis kontraŭ atendo tra/videbla (průhledná) kaj tia/maniere (tak) ili sukcesis tuj per unu fojo filmi kelkajn prov-filmaĵojn (záběry). Pluan daŭrigon de skafandristaj operacioj maebbligis ŝtormo. Kiam Malle kaj Dumas proksimume post unu semajno revenis, ili trovis la ŝip/ruinon kovritan per vualo (závoj) de disigita ŝlimakvo (kal). Ili ne povis filmi, eĉ la movo de skafandristoj en proksimeco de la ŝipruinoj estis kun/iĝita (spojena) kun granda risko. „Doria nun apartenas al la maro“ diris tiam Frederic Dumas. Sola filmsukceso de la ekspedicio restis dek ok sekundoj de provfilmaĵoj filmitaj tuj dum la unua subakviĝo.

Kun la sama ideo post dek du jaroj aperis surloke de la karambolo itala filma stabo de Bruno Vailati, kiu ĉi-tie filmis unu el daŭrigoj de la serio Sep maroj. Italoj invitis al kunlaboro enlandan skafandriston Al Giddings, spertan submaran filmiston kaj fotografiston. Al la ŝipruino kun subakviĝis (ponořili se) Vailati, Giddings kaj Stefano Carletti. Al Giddings priskribas (popisuje) la unuan malsupren/iron jene.

„Ni sinkadis malrapide laŭ ŝnurego (provaz). En profundo de tridek metroj estis la akvo plena de travideblaj meduzoj kaj aliaj animaloj. Ni faladis konstante pli profunden kaj ni fikse rigardis en krepuskon (šero) sub nin, por ke al ni ne for/kuru (unikl) la unua bildo de la subakviĝinta Doria. En profundeco de ĉirkaŭ kvardek metroj ni ekvidis sub ni ne/klaran konturon kaj postmomente eliris el mallumo potenca trunko de la ŝipruino. Akompanataj (doprovázeni) per fiŝ/aroj ni malrapide naĝis super ŝip/ferdeka superkonstruaĵo. Sesdek metroj sub nivelo en malvarma akvo kun videbleco ĉirkaŭ dek kvin metroj komenciĝis nia dudekminuta vizito, simila al stranga revo (sen). Neniam mi forgesos momenton kiam Bruno kun kamero kaj Stefano, kiu portis reflektorojn, trapenetris tra malfermita fenestro al promena ferdeko. Ĉe muroj de ŝipkoridoroj tordigis (svíjely se) ombroj de grandaj fiŝoj, fortimigaj de lumo. Niaj pensoj diskuradis (rozběhly se) en profundo al ĉiuj flankoj. Subite (náhle) mi ne povis rememori, de kie de la planko de la koridoro aperis granda angulhava malfermaĵo (otvor). Momenton daŭris ol mi ekkonsciis, ke Boris kuŝas sur flanko (bok) kaj ĝiaj ferdekoj tiamaniere fariĝis por ni muroj (zdi) kaj muroj ferdekoj. La angulhava malfermaĵo estis reale buŝo (ústí) de unu al transversaj koridoroj. Pli malfrue mi troviĝis sur fundo en profundo de sepdek kvin metroj, tuj apude sub kapitana ponto de la ŝipruino. Lumradio el mia skafandrista lampo vagis en unu el la dancsalonoj. Narkotika de nitrogenio mi vidis kiel en sonĝo interne la marajn fungojn elkreskantajn en vicigitaj linioj el muroj ...

Dudek minutoj limigitaj (vyhrazeny) al vizito de la ŝipruino rapide pasis. Kun mal/pli/iĝ/anta (zmenšující se) aerprovizo en aparatoj kaj pli ol horo de *dekunpremo* (dekomprese) antaŭ ni, ni rapide naĝis laŭ travitrita (prosklené) al nia ascenda (vzestupná) ŝnurego. Sekvis malrapida leviĝo al la unua dekunprema haltejo. Stefano dumvoje atente rigardis akvon ĉirkaŭ ni, por ke li povus nin ĝustatempe (včas) averti antaŭ ŝarkoj (žralok), kiujn ni vidis antaŭ malsupreniro krozi (křížovat) nivelonsupren la ŝipruino. En naŭ metroj ni haltigis leviĝon, por ke ni povu trapasu unuan gradon de dekunpremo. La sama procedo atendis nin ankoraŭ en ses kaj fine en tri metroj. Super ni luliĝetis silueto de la boato ...

Dum dudek unu malsupreniroj (sestup), kiujn italaj skafandristoj al la ŝipruino entreprenis, ili ekkonis ŝipon *Andrea Doria* de pruo (příd) ĝis metraj literoj de ĝis nomo sur poŭpo (zád). Ili gajnis unikan filmomaterialon *kaj* subakviĝo (potopení) al *Doria* alportis al ili neforgeseblajn (nezapomenutelné) travivaĵojn. Kiam ilin unue sur dekunprema haltejo atakis trimetra blua ŝarko, kapablis ĝin Stefano depeli (odehnat) por duobla piko (píchnutí) en ripoj (žebra).

Andrea Doria konstante ripozas en preskaŭ okdekmetra profundo sur fundo de Atlantiko kaj logas al vizito skafandristojn. Ĝi fariĝis por ili la sama nocio, kiel por alpinistoj Mont Everest. Sur ĝis balustrado (zábradlí) alkreskis centoj da maraj anemonoj (sasanky) kaj tra koridoroj tegitaj per teaka (týkové dřevo) ligno *trapeligis* fiŝoj. Tia estas la sorto (osud) de unu el la plej konataj ŝipruinoj de moderna tempo.

(Borský)

P.S. En Verda Familio oni erare skribis Andrea Doris, sed la ĝusta ŝipnomo estis Andrea Doria.

Kiel diri?

Konversaciaj frazoj laŭ Lentaigne. Temo: AGI – FARI.

„Agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi.“ AGO arbitra (libovolný, svobodný), punenda (trestuhodný), malbona, aŭtokrata. Agi bonfare, filantrope, maŝine, juste, noble, *prudente*, singarde (ohleduplně), kolere, partie (stranicky); por ies bono, por komuna bono, laŭ sia kapo, laŭ sia bontrovo (úvahy), laŭ ia oportuneco, sub masko de virto, por sia propra intereso. Planon teksu, plekti, ŝpini, efektiviĝi, realigi. Gigantaj projektoj. Projektoj, kiuj de realiĝo staras ankoraŭ malproksime; kiuj kirladas (víří) en lia kapo. Projektoj en aero. Konstrui kastelon en aero, sur glacio. Ĥimeraj projektoj. Preni sur sin la iniciaton de la afero. La ago sekvis la penson. Iniciativo absurda, sensenca. Preni sur sin la iniciaton de la afero. Fari ion je propra risko. Mia plano estas tia, ke mi esperas, ke ĝi bone fruktos. Senfruktaj provoj. Alpreni ion al la koro (tutkore interesiĝi). Havi forton por fari ion. Risorto (motivo) de lia agado. Determini (určit) la motivojn de ago. Okazu, kio okazos (Buď jak buď). Agi ŝultro ĉe ŝultro (kunlabori akorde). Komenco bona laboro duona. Jungi ĉiujn fortojn (napřáhnout všechny síly). Ataki novan taskon. Havi du ŝnurojn al sia arko (plurajn rimedojn por sukcesi). Akomodi (přizpůsobit) la rimedojn al la celo. Havi ĉiujn atutojn por sukcesi. Solvi ĉion per unu fojo. Lasi al iu liberan manon. Havi kubutliberecon (= esti libera pri siaj movoj). Havi medolon en la ostoj (= esti energia). Granda *parolista* estas duba *faristo*. Atribui al iu malsukceson. Per nenio oni faras nenion. Kiel agas li kontraŭ mi, tiel mi agos kontraŭ li ((uzu la esprimojn en la frazoj!))

Anekdoto: Dekdujara Joĉjo al sia patro: „Kiel oni parolas nur pri la diino (bohyně) de venko, sed ne pri la dio de venko?“ La patro respondas: „Kiam vi edziĝos, tiam vi komprenos.“

Sendis Jan Rybář, Ostrov

SKI-TAGOJ de la junularo en Špindlerův mlýn 16-22.1.1984 – 200 Kčs sen manĝado. Informoj:
Junulara sekcio de Ĉeĥa Esper.Asocio, 11000 Praha 1, Jilská ul. 10. Skribu tuj!

KORESPONDI DEZIRAS:

Dineu Mihai-Iulian, knabo P.O.Box 30-93, 71400 Bucuresti 30, Rumanio

Galina Tichonova, SU-601590 p.Velikodvorskij, Vladimirskoj obl., ul.8 Marta d.16 deziras korrespondi kun 16-18 jaruloj pri literaturo, muziko, sporto.

Dro Ferenc Hegedus, Banki D u 59 H 2840, Oroszlany, 35 j, pediatro, deziras kor ĉiuaĝulo (edziniĝinta), samfakulo.

S-ino Evelyn Kappers Jasmijnlaan 163, NL-7101, Winterswijk, 49-j.

D-ro Lloyd Mignerey, Otterbein Home, Lebanon, OH-45036, US, 87-jarulo, pri personaj travivaĵoj, observoj, viv-filozofio.

Esperanto-Klubo, Palacio Municipal, San Martin 899, 2600 Venado Tuerto, Argentino, dez. ricevi desegnaĵojn kaj ĉion por ekspozicio okaze 30j de la klubo.

Hilmar Ilton Santan Ferreira, 45j agronomia inĝ., Rua Alexandre Fleming 210, Goes Calmon, BR-45600 Itabuna, Bahia, Brazilo - pri ĉiuj temoj.

Rose Grigorova, Poltava 9D, kyt 5, BG-5000 Veliko Tarnovo, Bulgario.

Petrunka Tarneva, „Veslec“ 8a BG-4400 Pazarĝik, Bulg., 14j lernantino

Veselin Berkovski, Bulv G.Kacarov 113, BG-4210 Stambolijski, oficisto 32j pri moderna muziko, turismo, reciproka gastado.

Jolanta Zdanowicz, ul. Leśna 3/5, PL 58-560 Jeleni Gora, 22j oficistino

Zdislaw Bielawski, Plakovice 60c/5 PL 59-600 Lwówek Slaski juna instruisto pri edukado, sporto

Zbigniew Mazur, Grabieszczyce D5, PL-59-820, Leśna pri sporto, vojaĝoj.

Gintaras Žiaunys, Zemaitijos 9-25, SU-235500 Maženikiai, Litovio, 18j, interŝanĝas poŝtmarkojn, bildkartojn, diskojn.

Fraŭlino Rože Aukštikalnyte, Janonio 27, SU-235250 Pasvalys, Litovio, 23j genetika biologistino pri hundoj, psikologio

xmxmxmxmx

xmxmxmx

xmxmx

xmx

x

Otevřená listovní zásilka

Presajo

Imprimé 50%

Esperantský kroužek

Klubu pracujících

CS 29501 Mnichovo Hradiště

LIAZ 02-83/60-KP/Hr